S-ro S. A. Andrew (Cape Town) mal-konsentas kun la recenzisto, kiu (p. 43) kritikis *Estu mallonga* (= *konciza*) kiel Anglismon. Li diras: "Yet Millidge gives *Mallonge* = *briefly, in a few words*; and I have seen it time and again with that meaning in irreproachably good Esperanto . . . It is thrilling to be a co-sinner with Zamenhof, who makes Polonius say in Hamleto—

*Ĉar mallongeco estas la spirito  
De saĝo, kaj multvorteco estas  
La korpo kaj ekstera ornamaĵo,  
Mi ĉion tial diros tre mallonge.*

In translating I presumed that Antonio would prefer *mallonga* to *konciza* in addressing a messenger, and would probably reserve the less plebeian *konciza* for Kleopatru and her equals".

S-ro R. Roseti (Ponciau) skribas pri Versaĵoj por Infanoj (p. 68):

"Ni konstatu, ke Anglaj infanoj tre amas la ritmon kaj rimojn de siaj versaĵoj, *malgraŭ okazaj vortoj nekomprenataj*. Tio tute ne ĝenas ilin. Kie hiatas la kompreno, tie la sorĉa sono, la takto, la rimo, plene kontentigas. Kiam mi estis infano, mi ne komprenis *a pocketful of rye, a peck of pickled pepper, curds and whey, ware* (Simple Simon), *tuffet*; sed tio tute ne modifis mian ĝuon.

Do ni konstatu unue, ke la infanoj estas serene kuraĝegaj en la alproprigo de versaĵoj: nur la plenaĝuloj emas esti tro nervozaj, volante ĉion antaŭkribri. Ne necesas, ke la infanrimaĵoj estu zorge nivelitaj laŭ la plena kompreno de la infano: kie ĝi ne komprenas, tie ĝi plezuras pri la sono aŭ eĉ pri la *mistero* de la vorto. Tial ni ne domaĝu doni (kun la puraj infanaĵoj) ankaŭ bonajn poemojn: belaĵojn, kiujn la infano ne plene komprenos, sed tamen ĝuos.

Due ni konstatu, ke la infano ŝatas ne sole la simplajn, banalajn rimojn, sed ankaŭ la pli sonorajn kaj neordinarajn (*Mary, contrary; gander, wander, chamber; eĉ water kaj after*!). Tial ni ne perforte limigu nin ĉe *vin, ŝin, k.s.*"

S-ro Roseti daŭrigas kun pledo por *bonsona* elizio en Esperanto, kaj aldonas liston de poeziaĵoj taŭgaj por iom pli aĝaj infanoj ol la kvinjaruloj.

## THE T.J.O. CAMP AT IPSWICH

The Third International Camp of Tutmonda Junular-Organizo was held in Ipswich from the 14th to the 21st August and was attended by over 200 young people from Belgium, England, France, Hungary, Netherlands, Sweden and Wales. The local Education Committee had put a fine modern school building at the disposal of the visitors, and it made an ideal *kongresejo*. The green star flag of Esperanto was to be seen flying from the school's flagstaff throughout the week, and the rooms used for the various meetings were tastefully decorated with posters, flags and other Esperanto emblems.

On the 14th August the fine *fest-salono* was packed for the formal opening of the week's activities. The first speaker was Mr. Jack Heath (a head teacher, and Local Delegate of U.E.A.), who had been responsible for all the local arrangements. He was followed by the President of T.J.O. (Mr. Peter Krijt, of the Netherlands) and the Mayor of Ipswich (Alderman Mrs. Mary Whitmore), who offered a very cordial welcome to the visitors. Her speech was in English (interpreted by Mr. F. D. Murphy, F.B.E.A.) but she concluded with a perfectly delivered sentence in the international tongue. Among others present were the Chairman of the School Governors, the Borough Youth Organizer and the Chairman of the Education Committee.

During the week there were visits to local places of interest, and one day was occupied by a motor-coach trip to London (with a picnic tea in Epping Forest). There were several evening concerts, to which the campers themselves mainly contributed, and a lantern lecture on Youth Hostelling in various lands was given by Mr. F. Parker. The local G.F.S. gave a display of country dancing, and the Ipswich Co-operative Youth Choir entertained the assembly with typical English songs and glees. On the Sunday there was a service, conducted by Mr. F. D. Murphy, and attended by some 120 campers, as well as the Mayor of Ipswich and other visitors—including a

---

**The only member** who answered our appeal for postcard photos of members or of Esperanto functions of interest was Mr. Gardener of Hextable. We thank him heartily. But where are the others? Of even some highly-placed officials of our movement we have no photo at all. Next time you are taken, or your group or Federation meets, please bear the B.E.A. Library in mind.

German and a Yugoslav. The lessons were read by Miss Mary Krijt (Netherlands) and Mr. Lars Westman (Sweden), and the piano was played by Miss Morwen Hughes (Wales).

So many *pliaĝaj samideanoj* and other friends helped in the enterprise before and during the week, or encouraged the organizers by their presence as occasional visitors, that it would be invidious to mention individual names. But one exception must be made,—that of Mr. Heath, who bore the chief burden of the arrangements, and who, with all others concerned, must be warmly congratulated on the success of the gathering. It is possible that next year's Camp will be held in Northern France.

---

(Note.—We are asked to correct the note on page 80 of the last "B.E." regarding the T.J.O. subscription. The annual fee of 5/- covers membership and the 16-page magazine *La Juna Vivo*. For "membroj aspirantaj" (under 14 years of age) the annual subscription is 2/-, which covers membership and an 8-page magazine. Subscriptions in either category should be sent to Miss N. Rees, "Derwydd," Seven Sisters, Neath, Glam.)

## THEY = WE

Mathematicians and grammarians will perhaps doubt the possibility of this equation, but I hope to make it acceptable not only to them, but also to all our members.

"They" of course is the vast indifferent multitude which works and plays around us; "we" is the enlightened eager little company of practical idealists who are members of the B.E.A. So we like to think! Before "they" can equal "we" either quantitatively or qualitatively, there must be more informed, more co-ordinated activity on the part of the various singulars which go to make up the plural on the right side of our equation.

"We" are individually units in a society which contains a rich diversity of occupations, interests and talents. Our organization is fortunate in having officials whose activity and enthusiasm are such as to make one proud to be associated with their work. Among us throughout the length and breadth of the land are those who devote their knowledge and time to the service of our language and by so doing serve humanity. This they do continuously, not for a matter of months; and generously, with no thought of private profit.

Some are teaching:—classes or small groups, or acting as correspondence tutors;

some are writing:—articles, letters, bulletins, text-books, original works; some are carrying on linguistic exploration, in fields not fully covered; some are translating; some are doing administrative work, or gradually penetrating influential circles; some are talking (in public and in private!). Yet with all this faithful and inspired effort, individuals can reach only a small public, and accomplish only part of the work to be done. Hence the need for combined effort in various directions, particularly in specialist activities.

There are many among us who just by using Esperanto bring it to the attention of "them". Without conscious propaganda they impress their circle with the knowledge they have gained through literature and correspondence, with the friends they have made and kept. They have told how Esperanto has not only opened windows, but how it has also opened doors.

I want to suggest that every individual AMONG us is entitled to be ONE of us only if he or she is contributing to the spread of the language in some way or another.

Though many are proud of the fact that they have introduced others to the movement, more rapid conversion of "them" is necessary. Greater publicity would be an enormous advantage. Here is need for co-ordinated effort. We are often told that we should advertise more, that we don't do enough propaganda. Public meetings have been organized time and again with considerable expense and effort and inconsiderable results.

Advertising on a large scale, constant and purposeful, is needed, but for this we MUST have money. Those of us who have had anything to do with the matter know the high rates charged by widely-read journals; we know that an occasional insertion is of little value compared with a regular series; we know too that something must be offered, something attainable.

Our correspondence courses provide just such a solid core. They are one of the most successful means of getting new members, and new members equipped with a sound basis of knowledge. One meets students of these courses who rapidly become fluent speakers, given an opportunity to mix with experienced Esperantists. How delightedly these recruits realise their capacity and how well they take their place among "Us"!

I want to appeal urgently for the means to increase and maintain our advertisement campaign. It is an opportunity for co-ordinated effort, in which all can take part. It may be that YOU read regularly and thoroughly a particular magazine or newspaper. You know that it reaches intelligent

and thoughtful readers. Could you not offer to finance an advertisement for a definite period in this particular paper? If unable to do so individually, could you perhaps persuade your group, club or friends to make up the sum needed? It is better to act through the B.E.A. to prevent overlapping. Maybe you would rather leave the choice of a suitable magazine to the Office, which has intimate experience of success or failure in this matter of selection. One curious thing is that organizations where one would expect to find great interest have been unresponsive, whereas magazines which make no direct appeal to international understanding have given good results.

Nothing can replace direct personal influence, but well-directed, concentrated advertising will enormously widen our sphere of influence, give us a public, bring in new members, increase sales—in fact help to establish our new equation. And this brings me to my starting-point.

Will you NOW join in the effort to confuse grammar and mathematics, and make "They"="We"?

V.C.N.

## LA LINGVA PROBLEMO

### pritraktata en 35-mm. Filmo

Finfine aperis filmo kiu taŭge pritraktas la problemon pri internacia lingvo. La 27an de Aŭgusto, en privata kinemejo de la kompanio Gaumont-British en Londono, mi vidis la unuan prezenton de anglalingva filmo *In Other Words* (t.e. *Alivorte*), eldonita de la firmo Empire Film Productions. La prezento daŭris 20 minutojn, kaj ĉiu sekundo estis tiom interesplena ke mi senhezite profetas komercan sukceson. Konciza priskribo de la fluo de agado indikos la gravecon de la filmo laŭ Esperanta vidpunkto. (Mi donas nur la esencon de la dialogo).

Unue oni vidas kaj aŭdas aŭtentikajn scenetojn ĉe la mondfama libera oratorejo en Hyde Park, Londono. "Jen", diras la komentisto (kies voĉo estas bone konata al la Brita radio-aŭskultantaro), "oni aŭdas asertojn, deklarojn, demandojn, respondojn. La parolantoj penas konvinki la mondon pri la praveco de siaj ideoj: kaj oni ricevas impreson pri la valoro, la signifo de vortoj . . . sed nuntempe eĉ la lerneja knabo kapablas taksi la valoron de vortoj . . . Kaj ĉar ni parolas pri knaboj, ni vizitu anglan knablernejon."

La sceno aliĝas, kaj vidiĝas enirejo de impona lernejo. Tra la pordo kaj en la klasĉambron iras la fotografisto, kaj tie troviĝas junuloj de unuagrada (primara)

lernejo. Voĉo de instruisto aŭdiĝas *Esperantlingve*: "Enspiru!"—paŭzo—"Elspiru!" kaj la knaboj obeas. Oni vidas la instruiston. Li faras demandon, angla-lingve, al la knaboj: "Nomu tri famekonatajn turojn!" Respondas knaboj: "Turo Eiffel!" "Turo nevertikala de Pisa!"—paŭzo—"La Turo Babela!" "Ho, jes! kaj kion vi scias pri ĝi?" La knabo iom balbute klarigas la Biblian fabelon pri la diverseco de lingvoj, kaj tute nature oni parolas pri Esperanto.

"Nu!" diras la komentisto al la instruisto, "ĉu estis en Esperanto la ordonoj, kiujn mi aŭdis kiam mi envenis?" "Jes!" "Do vi instruas Esperanton ĉi tie?" "Jes!" "Ĉu ĝi havas specialan meriton rilate la instruadon al geknaboj?"

Kaj la instruisto klarigas koncize la (al ni bone konatajn) avantaĝojn, kiujn li konstatis dum multjara instruado de la lingvo. Fine diras la komentisto: "Sed ĉu Esperanto taŭgas ankaŭ por orientuloj—ĉu ili kapablas egale facile paroli ĝin?" "Jen demando, kiun oni faru al filologo, ĉu ne?" "Konsentite! Mi tion faros."

Sekve oni vidas belajn bildojn de la universitata urbo Cambridge, el kiuj la fina montras la enirejon al la mondfama kolegio St. John's. La komentisto eniras kaj intervjuas, en lia studejo, universitatan profesoron.

"Kion vi, filologo, opinias pri Esperanto?"

"Bonega lingvo!" respondas la profesoro—kaj klarigas laŭ lingvosciencia vidpunkto. "Sed por la orientuloj?"

"Ankaŭ por ili, sed eble ne precize tiom facile lernebla. Tamen vidu ĉi tiun fotografon. Jen mi, kune kun Polo, en grupeto ĉe Esperanta kunveno. La aliaj grupanoj estas Afrikanino, Perso, Tamilo, kaj Ĉino." La fotografo ekokupas la tutan ekranon: la ses personoj "ekvivas", kaj dum kelkaj sekundoj interparolas Esperantlingve.

Denove ĉe la profesoro. Post plua diskutado, demandas la komentisto: "Ĉu Esperanto taŭgas por jur-proceso?"

"En nacia juĝejo la jura lingvo estas specialaĵo; malfacile komprenebla eĉ al la nacioj; kaj devas tiel esti, dum la legoj estas esprimataj en 'leĝa' lingvaĵo. Do oni ne uzu Esperanton en naciaj juĝejoj, kvankam en internaciaj,—jes ja!"

Post egale facilaj enkondukoj kaj prezentoj okazas intervjuoj kun famekonata verkisto, komercisto, blindulo, kuracisto, agento de aertrafika kompanio (Pan-American Airways), kaj parlamentano. Teorie, tia serio da intervjuoj devus esti teda; sed efektive la temo, la personoj, la fono, la dialogo ĉiam kaptas kaj tenas la atenton. Precipe ĉarma kaj kortuŝa estas

la sceneto en kiu la blindulo per la fingroj legas Esperantlingve el brajla libro, kaj tradukas anglan al bela junulino kiu sidas sur la brako de lia brakseĝo. Senescepte la homoj sur la ekrano emfazas la bezonon de komuna lingvo, kaj uzas la vortojn "la internacia lingvo" kaj "Esperanto" kvazaŭ ili havas la precize saman signifon.

La filmo nun estas luebla al britaj kinemejoj (kelkaj luoj jam efektiviĝis) kaj espereble post nelonge ankaŭ enkasigos kelkajn dolarojn el Usono. B.E.A. havas la rajton eldoni kaj disluigi, post konsentita periodo, kopiojn de la filmo (16 mm.) por elmontri ĉe lernejoj, societoj, sindikatoj, k.t.p. Pri tio oni anoncos plue je taŭga momento.

W. A. GETHING.

## LA DOMO DE PACO

Tra ombro de la katedral' mi vagis en vespera horo;

Florado de antikva pio ŝajnis ĉiu ŝtona floro.

Mi pensis pri mortintoj sube, antaŭ longe kuŝigitaj,

Saĝulo, militisto, reĝ', en polvon ĉiuj jam ŝanĝitaj:

Malĝoja ĉe la koro, mi murmuris per timema vorto,

"Ĉi tiu templo, granda, bela, domo estas nur de Morto."

Alternaj, lum' kaj ombro ŝajnis viv' kaj morto miksiĝantaj;

Ĉu harmonie mi ne sciis, aŭ kontraŭe batalantaj.

Sed nun mi pensis pri mortintoj vivaj, kiuj bataladis

Pro libereco, pro justeco, pro la vero, kaj sangadis:

Dezir' batali por la bon' naskiĝis tuj en mia koro;

"Ĉi tiu templo estas dom'," mi kriis, "ne de Mort', sed Gloro!"

Pli malfortiĝis ombro, lumo, pro la suno subiranta,

La batalemaj pensoj velkis pro trankvilo alvenanta.

Denove mi eraris. Io kontraŭstaris min spirita;

Respondo venis de l' preĝejo, neaŭdita, komprenita.

"En sankta templo ne kuraĝu disputadi iu homo:

Forestas Mort'. La dom' de Dio de la Paco estas domo."

FLEMING FULCHER.



## ESPERANTO AT THE JAMBOREE

The first post-war Scout Jamboree, held last August in the Forest of Moisson, on the River Seine between Paris and Rouen, was noteworthy from the Esperantist point of view owing to the official use of the international language on a considerable scale, which it is to be hoped will form a precedent for all future Jamborees—and, for that matter, other international Scout gatherings and conferences. Only a small percentage of the Scouts, unfortunately, were actual Esperantists and thus free from the language difficulty, but the others had Esperanto brought to their attention in various ways, not only by its use in official documents side by side with French and English, but by similar trilingual notices in the Camp, and by such items as the words of General Lafont in the Camp newspaper:—"You are here to get to know one another, and if you are not an interpreter *and do not know Esperanto*, use the language of gesture". Many must have realised that gestures alone are a poor substitute for fluent speech!

A Congress of Esperantist Scouts was held during the Jamboree, and was attended by representatives of several countries, including Britain, France, Italy, Morocco and Sweden. At this gathering arrangements were discussed for reviving and expanding the *Skolta Esperantista Ligo*: to this end it is desired to gain the active support not only of all Esperantist Scouts but of many other *samideanoj* willing to promote this very important application of the language. British Esperantists interested are asked to communicate with Mr. F. N. Blythe, 103 Leopold Road, Ipswich, Suffolk.

## RADIO

**The B.B.C. and Esperanto**—On Oct. 9th, girls of the Seven Sisters TJO Group sang in Esperanto, and spoke about the recent TJO Camp at Ipswich, from the Welsh Station. On Oct. 18th F-ino Joy Hartley Bolton gave a short talk on Esperanto from the West of England Station. Gratulojn kaj dankojn al ĉiuj koncernitaj!

**Radio-dissendo el Hilversum**—Vendredon la 21an Nov. okazos dissendo pri religia temo el stacio Hilversum-II, 17.45–18.00 G.M.T. Ondlongo 415m. Oni petas aŭdintojn sendi dankesprimojn al N.C.R.V., Poŝtkesto 5, Hilversum, Nederlando.

**Aliaj Dissendoj**—Listoj de Esperantaj dissendoj diverslandaj aperas regule en la gazeto *Esperanto*, organo de U.E.A. Interesatoj notu!

## LOCAL NEWS

**Alfreton**—A class of 15 students has been started in the Secondary School under Mr. J. H. Shaw. (Wed., 6.30. Fee 2/6).

**Birmingham**—*Meetings* (3.15 at 26 Bristol Rd.): Nov. 15, Dec. 13.

**Blackburn**—On Sept. 6th an audience of 150 at the People's Hall heard S-ro F. Parker's lantern lecture "Esperanto from North Cape to Gibraltar, from Lisbon to Warsaw".

**Brighton**—*Class*: Friends Meeting House, Ship St., Thursdays, 7.0.

**Bristol**—Inter aliaj raportindaĵoj estas nova kurso kun 20 komencantoj. S-roj Tordoff kaj Watson faris propagandajn paroladojn, kun specimenaj lecionoj, en diversaj lokoj. La Klubo kunvenas ĉiusemajne, kaj la monataj Diservoj daŭre okazas ĉe la Popola Domo (Folk House), College Green. Je 8 Nov., de 3.30 ĝis 10 p.m., okazos Festo, kun varioplena programo. Geamikoj de F-ino Stella Toogood interese ekscios ke ŝi nun estas instruistino ĉe Castilleja School, Palo Alto, Cal., Usono.

**Debach, Suffolk**—Mr. T. Krik, a Yugoslav, is teaching Esperanto to about 30 Germans at the P.O.W. camp.

**Devon and Cornwall**—A meeting of the Federation took place at Bodmin on Sept. 6th, when members from six centres attended.

**Dunstable**.—Oficiala kurso sub Pastro Booty komenciĝis, kun 18 lernantoj.

**Felixstowe**—On Aug. 5 S-ro F. Parker gave a lantern lecture at the Youth Hostel on "Esperanto and Youth Hostelling in Twelve Countries."

**Grimsby**—*Class*: Wed., 7.30, at Church House, Bull Ring.

**Huddersfield**—Inter arangoj por la vintra programo estas elementa kurso kun 23 lernantoj kaj progresinta kurso kun 13. S-ro Butler vizitis 12 lernejojn en la urbo kaj apudaj vilaĝoj. Dek kvin anoj de la Grupo ĉeestis la "kunparencon" ĉe Tong Hall (vidu sube).

**Ipswich** — Local interest has been stimulated by the recent T.J.O. Camp. A class of 28 students under Mr. Jack Heath is being held at the Evening College, and one of 23 students, taught by Mr. Harry Simpson, under the auspices of the Co-operative Society. A third class is shortly to be formed, at the Y.M.C.A.

**Leeds**—*Meetings* : Mon., 7.30, at Church Institute, Albion Place. Programme from Sec., S. R. Dalton, 9 Artillery St., Leeds 7. *Classes* : College of Commerce, 43 Woodhouse Lane. *Elem.*, Wed., 6.30 (Miss Wilkinson). *Intermediate*, Fri., 6.30 (W. Green).

**Letchworth**—Bela ekskurso al Lilley Hoo okazis en Julio, kiam ĉeestis vizitantoj el aliaj urboj en la regiono kaj ankaŭ S-ino Isbrucker kaj Pastro Cseh el Nederlando. Je 4 Okt. oni gastigis la Konferencon de S.M.E.F. (vidu sube).

**Liverpool**—*Classes* : Mount St. Evening Institute, Hope St., Liverpool 1. *Elem.*, Tues., 7.0, 5/-. *Int. and Adv.*, Thurs., 7.0, 9/6. H. F. Ashworth, F.B.E.A.

**London Esperanto Club** (Fri., 6.30–9.30), at 153 Drummond St., Euston. Nov. 7, Internaciaj Popoldancoj. Nov. 14, Esperantaj Kantoj. Nov. 21, Kie Vi Laboras? Nov. 28, Satiro en la Esperanta Literaturo. Dec. 5, Kristnaska Foiro. Dec. 12, Zamenhofa Vespero. Dec. 19, Latunaj Blovinstrumentoj.

**London, N.10**—Local Esperantists meet every Wed. evening at 50 Hillfield Park, Muswell Hill. Visitors are invited.

**London, E.17**—*Classes* : Walthamstow Educational Settlement, Greenleaf Rd., Wed., 7.30–9.30. E. K. Osmotherly, D.B.E.A.

**London—Diservo**—2nd Sun., 3.15, at St. Barnabas' Church, Pimlico Rd., S.W.1. Speaker on 9 Nov., E. B. Johnson; 14 Dec., Rev. V. A. P. Hayman. Tea (1/6) at Oasis Café close by.

**Manchester**—The Society's meetings take place at the Adult Education Institute, 49 Lower Moseley St., at 2.30 p.m. 29 Nov., Jarkunveno. 20 Dec., El la Ĉapelo. *Tagmanĝrondo* at the same place every Thursday at 1 p.m. (in café). *Classes* : for details apply to B. McGrath, 10 Vernon Avenue, Stretford.

**Metropolitan-Vickers** — La Esperanta Grupo de la Lingva Klubo kunvenas dufoje ĉiumonate, 5.0–6.45. Detalojn sendos la Sek., S-ro J. Blackburn, Language Club, Metropolitan-Vickers Ltd., Manchester 17.

**Oldham**—Long reports of the local group, in *Oldham Chronicle*. The Director of Education is co-operating in sending drawings to the Lyon Esperanto Exhibition (*Esperanto*, p. 102).

**Reading**—*Meetings* : Wed., 7.0, in the "Summer House", corner of London Rd. and Donnington Rd.

**St. Helens** — *Classes* : Modern Girls' School, College St., Tues., 7.30.

**Southern Federation**—Je 31a de Aŭgusto okazis ekskurso al Brading en Insulo Wight, kiu estis tre ĝinda dank' al la klopodoj de la insulaj samideanoj. Post vagado kaj piknika lunĉo oni okazigis subĉielan kunvenon en ĝardeno, sekvitan de temaĝo kaj diversaj distraĵoj.

**South Midland Federation**—The 21st birthday of the Federation was celebrated at a Conference at Letchworth on Oct. 4, when the participants were welcomed by the Chairman of the Urban District Council. Mr. W. A. Gething presided over this very enjoyable gathering, and the varied programme included an "illustrated history" of the Federation, compiled by Miss S. V. Reed.

**Southport**—Arrangements are proceeding for the 33rd British Esperanto Congress next Whitsuntide, and a record attendance is hoped for. Details will be announced as soon as they are available.

**Sunderland** — *Class* : Mon., 7.0, at Whitburn Modern School. G. Moir.

**Yorkshire Federation**—Grandan sukceson trafis la Semajnfino ĉe Tong Hall (okt. 4–5), kiam 65 samideanoj renkontiĝis. Je sabato vespere okazis bela koncerto kun soloj, duetoj, kvartetoj, humoraj teatraĵoj prezentitaj de anoj el Halifax kaj Huddersfield, kaj komuna kantado. Dimanĉe estis himnokantado, kaj muzik-lekcio de S-ro M. C. Butler, kies ĉeeston kaj grandan helpon ĉiuj kore bonvenigis. Ses knabinoj el Sheffield tre bone kantis kaj dancis. La Prezidanto (S-ro Applebaum) nomis la feston *Kunparenco*, por esprimi la ideon de granda amika kunveno kiu ne estas ĝuste Konferenco.

(Raporto pri la *Propaganda Semajno* en Leeds aperos en la *B.E.* por Jan.–Feb., kun informo pri la aŭtunaj vizitoj de M. C. Butler al multaj lernejoj en Jorkŝiro).

**Watford**—Sec., W. H. Coventry, 22 Purbrock Avenue. At the Society's meeting on Aug. 28 C. C. Goldsmith described the Bern Congress, and on Sept. 25 B. Long spoke on experiences in Poland. *Class* : Alexandra School, Judge St., Tues., 8–9.

---

**B.E.A. Karavanoj al Bern** — Members concerned will be interested to learn that the Presentation Fund amounted to £19 4s. Grateful thanks to all subscribers.—M.J.

(Mr. Wilkinson most heartily thanks all those who contributed to this very generous gift. He also wishes to say how very much all at the Office have valued the many kind letters of appreciation received from members of the Karavanoj).



## NEXT YEAR'S UNIVERSAL CONGRESS

The following has been received from the Loka Kongresa Komitato:—

La venontjara Universala Kongreso de Esperanto okazos en Malmö. Pro valutaj cirkonstancoj la sveda Esperanto-movado elektis la nomitan urbon en la plej suda provinco, ĉar ĝi estas sufiĉe proksima al la plej granda parto de la Eŭropa kontinento.

La sveda movado kore bonvenigas vin al la 33a, al la provinco Skanio kaj cetero al la tuta Svedujo. Ni esperas, ke la Kongreso estu rezultoriĉa, kaj ke ĝi alportu novan energion al la movado.

**Note from B.E.A. Office**—In view of the present restrictions on foreign travel, the position with regard to the possible attendance at the Congress of those who enrol is still obscure. It is certain, however, that a number will wish to support the Congress by enrolling even if, at present, their attendance is uncertain. An enrolment form will be found on page 3 of the cover, and it will be seen that the Congress fees increase at the end of the year. *It must, however, be borne in mind that enrolment does not imply or assure that members will be able to attend.*

Further information concerning any possible arrangements for attending the Congress will be published as soon as feasible.—R. B. WILKINSON.

## S-ro R. J. VERTH

La Edinburga Societo funebras la morton de ĉi tiu malnova kaj valora membro, senlaca kaj sindona laboranto pri multaj movadoj, en kiuj, pro liaj grandaj talentoj, lia helpo estis multe dezirata kaj ŝatata. Kiel prezidanto de la Popola Teatro, de kiu li estus pioniro, li estis bone konata inter teatraj rondoj amatoraj. Antaŭ kelkaj jaroj li gajnis la premion por deklamado ĉe Edinburga Festo, kaj pro lia sperto, klara elparolo kaj esprimovo la

B.B.C. petis lian helpon dum la militaj jaroj. Sociaj kluboj, la "Film Guild", kaj la organizado de distraĵoj por soldatoj, okupis multe de lia tempo. En la nuna jaro li esperis ĉeesti la Kongreson en Bern, sed devis nuligi la aranĝojn pro subita malsaniĝo. Li okupiĝis interalie per naĝado, golfudo, promenado kaj ĝardenkulturo. En ĉiu sfero de lia agado oni ricevis la anoncon pri lia morto kun profunda bedaŭro kaj sento de granda perdo.—J.H.

## NEW BOOKS

\* Obtainable through B.E.A.

**\*Plena Vortaro**—*Sennacieca Asocio Tutmonda*. Price 20s., postage 8d. This is styled "Third Edition", but is a facsimile reprint of the last issue, which has not been available for some time. The reprint is very welcome, and many members of B.E.A. who do not possess the book will be glad to have an opportunity of buying it. The publishers state in a note that they intend the projected revised edition to be a larger work, and to be illustrated, but they explain that it cannot appear for a considerable time and that the present reprint is issued to fill the gap. It is, of course, not possible for any dictionary actually to be *plena* (and the present work omits quite a number of commonly used words while including many that are seldom met with), but even as it is, this completely international volume of over 500 pages, explaining, in Esperanto, the meanings of each word, is a unique and extremely useful book for serious students of the language.—B.L.

**La Rekonstruo de la Roterdama Urbokoro**—18-paĝa libreto, ŝajne senpaga. Ĝi pri-skribas la laboron nun faratan por rekonstrui la detruitan urbocentron. Ilustras ĝin dek planoj kaj mapoj. Eldonaĵo unika en nia literaturo, kaj tre interesa por ĉiu, kiu sin okupas pri arkitekturo aŭ urba planado. Lingve modela.

Parenteze, la eldonistoj (J. G. Both, Konsilejo por la Rekonstruo de Roterdamo, Coolsingel 107, Rotterdam) deziras kontakti aliajn homojn tutmonde por interŝanĝi ideojn pri urbokonstruado. Ankaŭ (por propaganda ekspozicio) ĝi deziras ricevi ĉiuspecajn materialojn, aparte afiŝojn pri trafiko kaj ŝipveturado, turismajn gvidlibrojn, k.s., el ĉiu lando kaj pri ĉiu temo.

\***La Nevenkebla Geno** — T. Thijssen, tradukita el la Nederlanda lingvo de F. Faulhaber. 319 pp., 9s. 6p., afranko 7p.

Ĉi tiu libro estas el la serio eldonita de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj, kiu jam enhavas tiajn librojn kiaj—inter aliaj *Fontamara*, *Kulio*, *La Hispana Tragedio* kaj *La Perfido*—kaj ĉi tiu plene meritas sian lokon inter tiuj bone konataj libroj. La aŭtoro prezentas al ni "laĉon da simplaj rememoroj de Joop van Saten, kiu, vivinte pli ol duonan jarcenton, vidas, ke tra lia vivo plektiĝis obstina fadeno el unu sama ĝeno"—kaj tiu ĝeno estas la mizero kaŭzita de la tualetaj problemoj. Malmulto ekscita okazas en la vivo de Joop—jen, ankoraŭ infano, li unue spertas la ĝenon ĉar li devas porti "knabinajn botaĉojn", jen en la lernejo li hontas ĉar lia pantalono enhavas nur unu poŝon, jen li lerte trompas la kapitanon ĉe la uniform-inspektado kiam li deĵoras en la armeo, jen li mem iĝas patro kiu devas oferi pluvmantelon por fari vestojn por la infano, kiu kompreneble trovos ĝin netaŭga pro ia manko kiun la stultaj plenaĝuloj ne povas kompreni; sed el ĉi tiuj kaj similaj etaj ĝenoj kaj triumfoj Thijssen verkis etan majstroverkon. Kelkaj el la historioj estas ja ridindaj, sed la plimulto priskribas la suferojn kaj ĝojojn de Joop tiel klare kaj kun tiom da kompreno pri la reala sufero kiun tiuj aferoj povas kaŭzi al impresebla knabo, ke oni estas duone amuzita sed ankaŭ duone kortuŝita. La stilo estas simpla kaj flua, kiel konvenas al la enhavo, kaj la trafaj desegnoj de Schuurmans aldonas al la ĉarmo de la libro.

La Esperanto estas bona—ne nur en la senco, ke mankas la kutimaj eraroj, sed bona en la senco, ke ĝi mem donas plezuron al tiu, kiu ŝatas la lingvon; sur preskaŭ ĉiu paĝo troviĝas lertaj parolturnoj aŭ neoftaj kunmetaĵoj, ekzemple, *mi estis unu sperton-pri-vestoj pli riĉa*; *la korpokovrilaro*; *ĉu vi ne povas pagi monere*; *kia saŭmo ili estas*; *li estas vizite ĉe S-ro B.*; notinda ankaŭ estas la lerta verbigado de substantivoj por eviti la troan uzadon de *diri* en libro en kiu la konversacio ludas grandan rolon; ekzemple, *mi prudentas*; *ŝi verdiktas*; *ni solidaris*; *patro akris*; *li hipokritas*; kelkaj aliaj citindaj esprimoj estas:—*li promenis en sia nuda umaĝo*; *ŝi servistinos*; *mi instruistas* (act as teacher although not officially appointed); *ĉu vi ankaŭ muelas pri . . . ?*; *agrablus al mi . . .*

Pro la bona lingvo mi povas senhezite rekomendi la libron kiel taŭgan por lernantoj—des pli ĉar ĉiu ĉapitro estas kompleta en si mem—sed ankaŭ lingvo-spertulo povas lerni multon el ĝi. Egale

senrezerve mi rekomendas ĝin al ĉiu kiu volas akiri libron kiu estos legata kaj relegata kun plezuro.—K. ALEXANDER.

### NASKIĜOJ

**Jones**—Je 17 Sept., al Ges. G. H. Jones, 11a Cavendish Rd., Blundellsands, Liverpool 23, filino, Madeleine Frances.

**Young**—Je 24 Sept., al Ges. Kenneth Young, 93 St. Margaret's Avenue, North Cheam, filino, Wendy.

### EDZIĜOJ

**Smith—Stroud**—Je 4 Sept., en Corfe Castle, S-ro Alec Smith, el Great Malvern, kun F-ino Eileen D. M. Stroud, el Corfe Castle.

**Wedderburn—Mitchell**—Je 27 Sept., ĉe Kincardine O'Neil, S-ro Joseph Wedderburn, Prezidanto de la Esperanta Klubo en Aberdeen, kun F-ino Mary Mitchell, Kasistino de la sama Klubo.

### MORTOJ

**Robertson**—Je 28 Aŭg., S-ro A. W. Robertson, 78-jara, alte estimata membro de la Grupo en Rochdale.

**Verth**—Je 2 Aŭg., S-ro R. J. Verth, el Edinburgo, Vic-Delegito de IEL-UEA. (Vidu nekrologon sur alia paĝo).

for

Printing  
Bookbinding  
and  
Stationery

consult

The Printer of this  
Magazine

TELEPHONE

EASTBOURNE 611

## Small Announcements

2d. per word. Minimum 2/- per issue. Prepaid. Copy must be received at B.E.A. Office by the 8th of the previous month.

**To Sussex Esperantists**—Full stocks of all books in Esperanto kept. S. A. Hayward, Bookseller, 9 Station Street, Lewes, Sussex.

**The Workers' Esperanto Movement (S.A.T.E.B.)**—Esperanto with a purpose—world education for world socialism. Write for "The Worker Esperantist", the official organ, 3d. post free, to K-dino N. Walton, Summerfield, Wadsworth, Hebden Bridge, Yorks.

**Monomark Service**—Permanent London address. Letters redirected. Confidential. 4/- p.a. Royal Patronage. Write, Monomark, BCM/MONO5W, London, W.C.1.

**British League of Catholic Esperantists**—Details from Hon. Sec., Norman W. Vigar, 43 Defrene Road, London, S.E.26.

**Kalendaro, La "Fulmo" Ĝiamdaŭra**—ĉi tie oni trovos dattabelon pri ĉiu monato de iu ajn jaro. 1ŝ. 0p. de B.E.A.

**Ordinary writing** at 100–120 words per minute. All languages. Test lesson 3d. Dutton Speedwords (S56), 92/3 Gt. Russell Street, W.C.1.

**To all Socialists and Labour Party Members**—Please help to get Esperanto officially accepted! Write to Hilda de Vere, Bela Monto, Wrotham, Kent.

**B.E.A. Literary Service**—Send stamp for particulars of facilities offered to authors and students. B.E.A., 140 Holland Park Avenue, London, W.11.

**Read "Youth Echo"**, 3d., 519 Barlow Moor Road, Manchester, 29.

**Wanted!**—Up to six copies of Ellernu by Szilagyí. Write to W. Hartley Bolton, 39 Queen's Avenue, Dorchester, Dorset.

**Socikredito**: Mallonga Klarigo 2½d. stamp, or 6 for 7d. Kio Estas Socikredito? 7d. post free. Published by Social Credit Co-Ordinating Committee, Gordon House, Carrington St., Nottingham, and also obtainable from the B.E.A.

**Schools teaching Esperanto** will find in "Juna Espero" puzzles to interest young beginners, competitions and reading material. Price 3d. (post free) from Miss Rees, "Derwydd", Seven Sisters, Neath, Glam.

**Telepatio**—Parolado de S-ro C. H. Grugeon, M.A. Dec. 3an ĉe Fred Tallant Hall, 153 Drummond St., Euston, N.W.1. 7 p.m. Ĉiuj bonvenaj. L.E.S.S.

**Books Wanted!**—(a) A Short History of the International Language Movement, Albert Léon Guérard, Fisher Unwin, (b) International Language (past, present and future), W. J. Clark, Dent. Offers with prices to Edmund Willcocks, F.B.E.A., "Eastholme", Lansdowne Road, E.18.

**Wanted!**—Fulcher & Long Dictionary, reasonable condition. "Homestead", Alton Road, Parkstone, Dorset.

**Esp. Unio de Liberalaj Religianoj** (32, Hillcourt Road, S.E.22). Diservo okazos la 7an Decembro je la tria horo p.m. ĉe la Stratford Unitariana Preĝejo, West Ham Lane.

## BOOKSHOP NOTES

**Magazines** — New subscription rates **Heroldo de Esperanto** 17/6 from Oct. 1947 to Dec. 1948. **Internacia Kulturo** 10/- from Jan. to Dec. 1948.

New supplies have been received of **La Psalmaro** price 4d. **Economy Labels** price 1/6 per 100 and **Green Star Seals** price 9d. per 100. **Linguaphone Conversational Course**, 5/-.

**Malgranda Revuo** 1947. No. 3 now ready, price 1/8 post free; also available numbers 1 & 2 of 1947. Some earlier numbers available to order.

**Esperanto Keys** again in stock—**Basque** 3d., **Japanese** 3d. post free.

**Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo**—Only a few left. 150 pages, 32 beautiful plates. Bound green rexine. An excellent present. 14/1 post free.

## Official Notices

### THE BRITISH ESPERANTO ASSN. INC.

**President**: Miss Margaret Jay, M.A.

**Hon. Secretary**: Bernard Long, B.A.

**Hon. Treasurer**: A. Venture.

**Secretary**: R. B. Wilkinson.

**Education Secretary**: M. C. Butler, M.R.S.T.

**Registered Office**: 140 Holland Park Ave., London, W.11. *Hours*—Weekdays: 9 a.m. to 5.30 p.m. Saturday: 9 a.m. to 12.30 p.m. *Telephone*: PARK 7821.

### NEW MEMBERS

Adhikari, R. C.

Allaire, J. D.

Aznar, S.

Beaumont, G.

Beck, N.

Blake, R. C.

Bowers, R. D.

Calcutta

Manchester

London, S.W.4

Blackpool

Peterborough

Horsham, Sussex

Elie, Fife

Bradshaw, T. M. *Wimblington, Cambs.*  
 Brown, K. H. *St. Austell.*  
 Clarke, Mrs. K. M. *Derby*  
 Cochran, R. W. *Glasgow*  
 Croucher, Capt. T. G. *Worksop*  
 Das, S. *Bengal*  
 Davies, W. D. *Croydon*  
 Dewhirst, H. *Hebden Bridge*  
 Drake, A. J. *Penang, Malaya*  
 Dumble, Miss H. M. *London, E.2*  
 Eyre, W. *Sheffield, 5*  
 Fitzpatrick, G. A. *London, E.11*  
 Gateshill, B. *Handforth, Cheshire*  
 Grant, Nurse E. F. *Bradford*  
 Green, A. *Hemel Hempsted*  
 Jones, E. W. H. *Ruislip*  
 Lloyd, G. C. *Accrington*  
 Maude, E. S. *London, S.W.1*  
 McDowell, J. P. *Belfast*  
 Millard, T. W. *Taunton, Som.*  
 Milczynski, Z. F. *Birdham, Chichester*  
 Morgan, H. *Westerleigh, Bristol*  
 Morris, Mrs. C. *Wigan*  
 Moynihan, P. *Liverpool, 12*  
 O'Sullivan, L. *Dublin*  
 Pemberton, A. *Sheffield, 6*  
 Perrin, F. W. *London, N.17*  
 Salisbury, J. L. *London, S.E.13*  
 Smith, W. B. *New Seaham*  
 Stones, Miss M. *Torquay*  
 Turner, H. F. *Burnham, Bucks.*  
 Walton, F. *Altrincham, Ches.*  
 Wells, F. E. *Welwyn Garden City*  
 Wiener, F. *Blackburn*

**Junior Members—**

Ashworth, Miss I. M. *Gloucester*  
 Batty, P. R. *London, E.13*  
 Clayton, D. *Perth*  
 Eason, L. G. *Splott, Cardiff*  
 Ferguson, D. *Liverpool, 6*  
 Haskell, V. F. *Slough*  
 Johnson, N. M. *Doncaster*  
 Matthews, D. H. *Beeston, Notts.*  
 McGowan, Miss E. *Dewsbury*  
 Pilgrim, J. A. *Sheffield, 9*  
 Powell, R. V. *Oakengates, Salop*  
 Robinson, E. K. *Lisburn, N. Ireland*  
 Sheffield, L. *Tadcaster*  
 Stewart, R. I. *Belfast*  
 Taylor, W., Jnr. *Lower Adlington*  
 Vibert, G. R. *St. John, Jersey*  
 Walker, J. G. *Nottingham*  
 Winstone, J. H. *Gloucester.*

**CANDIDATE FOR FELLOWSHIP**

Williamson, J. *Elstead, Surrey*

**NEW LOCAL DELEGATES**

**Birmingham**—D: J. Collier.  
**Deal**—D: E. Halliday.  
**Folkestone**—D: J. S. Clough.  
**Henley-on-Thames**—D: C. L. Grugeon.

**London, S.E.9**—VD: Miss M. Diggles.  
**London, S.E.13**—VD: W. Haines.  
**Reading**—D: W. T. Allen, J.P.  
**South Cerney**—D: G. L. Preedy.

**B.E.A. EXAMINATION SUCCESSES**

**Elementary**—Miss A. Bolland, Miss J. Clark, N. J. Wadsworth, *Sidcot*; \*W. Manuel, *Dalkeith*; \*Mrs. H. R. B. Mackay, \*W. McCallum, *Edinburgh*; J. W. Richards, *Teddington*; T. C. Fathers, *Lingfield*; Mrs. D. E. Chilton, *Henley*; \*F. Wilby, *Reading*; S. North, *Huddersfield*; Mrs. R. M. Dhonau, *London, N.W.2*; P. S. Toulmin-Rothe, *West Drayton*.

**Advanced Examination — Written Part —**  
 \*Birger Gerdman, *Stockholm*.

\* *With Distinction.*

**DONATIONS TO B.E.A., AUG.—SEPT.**

J. Course (Royston), £5; J. L. Ford, £2. 2s.; Miss E. Mayhew, 10/-; H. Iddon, 6/-; J. Barlow, Miss N. Hanson, Mrs. G. Harrop-Lomas, 2/6; Miss J. Mellis, 1/2; J. P. McPowell, 1/-.

**DONATIONS TO ADVERTISING AND PUBLICITY FUND, AUG.—SEPT.**

H. W. Allen-Smith, Miss E. A. Ashby, Miss D. Purvis, A. G. Tucker, £5; Mrs. V. and Miss S. Reed, £2. 10s.; Miss E. J. Downes, £1. 5s.; G. D. Edwards, L. F. Hunter, £1; A. Prince, 15/9; H. Penfold, 12/9; Miss A. Viggars, 10/-; Miss E. Baldwin-Smith, 7/-; T. Elderkin, 5/-; J. Lovell, 3/6; M. Stringer, 2/6; D. R. Leighton, 1/6; K.G.M., 9d.; L.W., 8d.

**Grateful thanks to all donors.**

R. B. WILKINSON, *Secretary.*

**The British Esperantist**

**Publishers:**

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, INC.  
 140 HOLLAND PARK AVENUE, LONDON, W.11.  
 Tel.: PARk 7821.

**Editor:** MONTAGU C. BUTLER, M.R.S.T.,  
 36 PENRHYN ROAD, KINGSTON-ON-THAMES, SURREY.  
 Tel.: KINGston 1484.

Contributions should be typewritten, and sent in by the 8th of the previous month. The Editor reserves the right to refuse, correct, or shorten them. He is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned.

All communications respecting display advertising in *The British Esperantist* should be sent to Mr. H. L. Walker, 173 Fleet Street, London, E.C.4. Telephone: CENTral 5610. When communicating with advertisers, kindly mention *The British Esperantist*.

Kongresa  
Numero :

# 33-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO MALMÖ, SVEDUJO

31a Julio—7a Aŭgusto, 1948

Adreso : 33a Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, Svedujo

## ALIĜILO

**Mi aliĝas** al la 33a Universala Kongreso de Esperanto kaj kunsendas . . . . . laŭ la subaj detaloj.

Familia nomo (1) S-ro, S-ino, F-ino.....

Personaj antaŭnomoj (1) .....

Profesio (2)..... Nacieco (2).....

Strato kaj N-ro (1).....

Urbo aŭ vilaĝo (1) .....

Provinco (1) ..... Lando (2) .....

Nomo de la edzo, edzino aŭ familiano, kiu samtempe (pere de apartaj aliĝiloj haveblaj ĉe B.E.A.) aliĝas al la kongreso

.....194.... Subskribo.....

(1) En nacia lingvo. (2) En Esperanto.

B.V. skribu klare, kaj uzu apartan aliĝilon por ĉiu kongresano.

## KONGRES-KOTIZOJ

	Ĝis 31-12-47	Ĝis 31-3-48	Poste
1. Kongres-kotizo .. ..	28ŝ.	35ŝ.	42ŝ.
2. Por la edzo aŭ edzino de kongresano .. ..	14ŝ.	21ŝ.	28ŝ.
3. Por gejunuloj ne pli ol 20-jaraj	11ŝ.	14ŝ.	21ŝ.

Aliĝilojn kaj pagojn oni sendu al—

## BRITA ESPERANTISTA ASOCIO

140 Holland Park Avenue, London, W.11

GRAVA NOTO : Pro la nuntempaj valut-reguloj, aliĝo al la kongreso ne signifas ke Brito nepre rajtos vojaĝi al la kongreso.

**SOMETHING TO INTEREST EVERYONE !**

## **ESPERANTO FOR ALL**

The most useful  
**Propaganda Booklet**  
yet published

5d. post free

From B.E.A.

## **“USE THE HIGHWAY”**

**POSTCARDS**

With propaganda  
illustration on  
reverse

Per dozen 7d. post free

From B.E.A.

### **THE SPREADING OF ESPERANTO !**

Send a donation to  
the B.E.A. Advertising  
and Publicity Fund  
with your book order.

## **REGAIN YOUR ENTHUSIASM**

by reading

## **THE LIFE OF ZAMENHOF**

Translated from the original  
Esperanto of Dr. Privat by  
RALPH ELIOTT

Cloth 2/6, postage 5d.

**Then lend it to your Friends**

## **EVERY ESPERANTIST**

should possess a copy of

## **THE LANGUAGE PROBLEM**

by E. D. DURRANT

Cloth 5/5, paper 3/4, post free

You cannot convince your friends  
if you do not know the facts  
yourself !

**B.E.A., 140 HOLLAND PARK AVENUE, LONDON, W.11**

